

Magdeburga folio

Neregula interreta informilo
pri aktualaĵoj
el la mondo esperantista



N-ro 130(30)

Novembro-Decembro 2015

Se Esperanto estas tiel facila, kial oftas eraroj en tekstoj?

Mi amas librojn. Ĉiam estas ekscita momento teni novan libron en la manoj kaj komenci rigardi, foliumi kaj legi ĝin (verdire mi ankaŭ unue ĝin flaras). Ĉe Esperantaj libroj mi tamen lernis resti unue iom rezervigema por gardi min kontraŭ disreviĝo: ofte ĝenaj eraroj gramatikaj kaj vortaraj formanĝas parton de la ĝuo. Kiam la infanoj estis malgrandaj kaj mi voĉlegis al ili Esperantajn infanlibrojn, mi ĉiam devis esti preparita por dumlege korekti erarojn. Kaj kiam oni recenzas libron, preskaŭ ĉiam oni devas decidi, ĉu komenti ankaŭ la lingvaĵon, kiu, diable, devus esti tute malĉefa afero – se ĝi do estus en ordo.

Rimarku, ke mi ne parolas pri *variado*, kiu nature estas pli granda en Esperanto ol en lingvoj, kies normon difinas la kaprica evoluo ĉe denaskaj parolantoj. Ke oni povas kaj *helpi iun* kaj *helpi al iu*, dum la plimulto de la lingvoj permesas nur unu el ĉi tiuj alternativoj, estas avantaĝo de Esperanto. Ke la vorton Fundamentan *disreviĝo*, uzitan en la antaŭa alineo, iuj aliaj prefere anstataŭigus per *elreviĝo*, *trompiĝo* aŭ eĉ *desaponto*, estas fakto, kiun mi senproteste akceptas. Per la vorto *eraro* mi celas proksimume "esprimon, kiun la verkanto aŭ parolanto ne uzus, se ŝi-li sciis Esperanton pli bone". Do, mi formulu mian demandon ĉi-fojan jene: se Esperanto estas tiel facila lingvo, kiel ni esperantistoj diras (kaj ankaŭ subjektive mem spertis!), kial do nia lingvoscio estas tiel mankhava, ke oftas eraroj en libroj kaj aliaj tekstoj?

En blogaĵo pasintajara mi klarigis, kial la demando pri simpleco aŭ facileco de lingvoj (sen paroli pri ilia logikeco) estas problema en la lingvistiko. Kvankam la ideo pri diversgrada simpleco de diversaj lingvoj estas multe diskutata, pli kaj pli da lingvistoj nuntempe tamen pretas akcepti, ke efektive iuj lingvoj estas pli facile lerneblaj ol aliaj tiam, kiam temas pri *plenkreskuloj lernantaj novan lingvon aldone al sia denaska*. Ni povas do paroli pri diferencoj en la *L2-facileco* de lingvoj, kie *L2* signifas 'duan lingvon' (kiu kompreneble povas esti tria aŭ kvara, sed gravas, ke ĝi ne estas *L1*, la lingvo kiun la koncerna homo akiris infanaĝe kiel sian unuan).

Unu el la ĉefaj trajtoj influantaj la L2-facilecon de iu lingvo estas, kiajn gramatikajn distingojn oni *devige* devas fari en la lingvo, kaj kiel simplaj estas la markiloj, uzataj por indiki tiujn distingojn. Tiurilate Esperanto estas relative facila. Ekzemple, ĝi havas nur tri verbotempojn kaj iliaj markiloj estas ĉiam la samaj (*-as*, *-is* kaj *-os*). Aliflanke, Esperanto estas pli malfacila ol la lingvoj, kie oni tute ne bezonas marki la verbotempojn, se en la kunteksto estas klare, pri kiu tempo oni parolas. Estus pli facile, se oni ne bezonus elekti la ĝustan finaĵon en *Mi respondos al vi tuj kiam mi finleg- ĉi tiun leteron*.

La gramatiko de Esperanto tamen entenas almenaŭ tri trajtojn, kiuj malpliigas ĝian L2-facilecon kaj ofte kaŭzas erarojn:

1. La akuzativo. Estus pli facile, se ni ne bezonus devige marki la rektan objekton (kaj kelkajn aliajn frazopartojn) per *-n*. La komencantoj ofte forgesas pri ĝi. Lerninte iom pli, ili komencas trovi ĝin: **okazis akcidenton kaj mankis helpantojn!* (Tiajn troajn uzojn la lingvistoj nomas hiperkorektismoj.) Estas interese kompari tion kun la norma bulgara lingvo, en kiun oni siatempe enkondukis distingon inter la nominativa kaj akuzativa difinaj artikoloj de la vira genro, kvankam neniu bulgara dialekto konas tiun distingon: ordinaraj bulgaroj ofte eraras pri tiu distingo, kiam ili skribas sian gepatran lingvon – kvankam oni uzas ne malmulte da energio por instrui ĝin en la lernenoj. Neniu bulgaro uzas tiun distingon konsekvence en parolado, ĉar tio estus tro malfacila. (Efektive, mi, por kiu la bulgara estas L2, eraras malpli ol la mezuma bulgaro.)
2. La deviga distingo inter transitivaj kaj netransitivaj verboj, kiun oni devas aparte lerni ĉe ĉiu verboradiko. Oni devas lerni, ke la kunveno ne povas *komenci* au *fini*, sed ĝi ja povas *ĉesi*; aŭ ke oni *ĉagreniĝas*, sed ne *indigniĝas*, nur *indignas*. La afiksoj *-ig-* kaj *-iĝ-* ofte mankas aŭ, male, estas uzataj superflue.
3. La difina artikolo *la*. Por la parolantoj de la lingvoj, kiuj ne devige markas difinitecon, ĝia uzado estas malfacila. Finnoj, rusoj aŭ poloj ofte ĝin forgesas. Kaj eĉ la lingvoj, kiuj havas difinan artikolon, uzas ĝin laŭ diversaj reguloj. Ĉu ni diru (**)homa socio baziĝas sur lingvo*, kiel la angla, aŭ *la homa socio baziĝas sur la lingvo*, kiel verŝajne la plimulto de la lingvoj artikolhavaĵ?

Rimarku, ke mi ne proponas reformi Esperanton ĉi-rilate. Tio ne eblas. Mi nur konstatas, ke la gramatiko de Esperanto devigas nin marki certajn distingojn, kiuj ne en ĉiuj lingvoj estas devige markataj, kaj tio estas unu fonto de eraroj.

Tute alispeca fonto de eraroj estas, paradokse, la reputacio de Esperanto kiel facila lingvo. Tio instigas multajn samideanojn al maldiligento: ĉar la lingvo estas tiel mirinde facila, kial mi peni lerni ĝin pli kaj pli? Prefere mi tuj komencu uzi ĝin kaj traduki la klasikaĵojn de mia nacia literaturo! – La homoj, kiuj promesas, ke Esperanto estas dekoble pli facila ol iu ajn alia lingvo, estas ĉarlatanoj kiuj ege malutilas al ĝi.



La afiŝtabulo de la Universala Kongreso de Lillo tamen kuraĝige montras, ke senerara uzo de Esperanto eblas... Dankon al [Larissa Bister](#) pro la foto.

Sed ofte temas ne pri maldiligenteco aŭ pri malvolo lerni pli. Finfine, lingvoscio estas ne teoria scio, sed praktika scipovo. Mankas ebloj kaj okazoj praktike uzi Esperanton, sin ekzerci en ĝi. Tion oni vidas, kiam oni komparas Esperanton kun la angla, kiun pli kaj pli da homoj vole-nevole devas ĉie legi kaj aŭdi, ofte ankaŭ skribi kaj paroli. Ni atingas tian lingvoscion en la angla, kian havas la denaskaj parolantoj, sed pli kaj pli da homoj lernas paroli angle pri difinitaj temoj sufiĉe bone.

Esploroj en Finnlando montris, ke knaboj ofte lernas la anglan pli bone ol knabinoj, ekster la lernejo, danke al komputilaj ludoj. Kaj konsideru ĉi tiun interretan afiŝon de 14-jara finna knabo, kiu neniam vizitis anglalingvan landon nek uzis la lingvon en eksterretaj situacioj kun denaskaj parolantoj:

Just saw botfa. It was very awesome! It was a fantastic movie imo. Dain was awesome. I did not find legolas' stunts bad or anything. Beginning was awesome, also dol guldur and the battle. It was sad, and the performances of the dwarves were amazing. Lee pace portrayed Thranduil amazingly. Then ending was sad and very well done, although it felt a bit rushed, but I'm sure that will change when EE comes around. The cgi was very well done for the most part, only the elven army standing before the gates of erebor looked a bit fake, but it did not ruin the movie at all. Music was amazing too. It was better than DOS for sure, and i liked it as much as AUJ (a big fan of that movie although many would disagree). Thank you PJ, actors, the full team for this amazing journey that has lasted for 17 years.

Klarigoj: *botfa* = la filmo *The Battle of the Five Armies* | *imo* = *in my opinion* | *Legolas* (nomo) | *Dol Guldur* (nomo) | *Lee Pace* (nomo de aktoro) | *Thranduil* (nomo) | *EE* = *extended edition* | *cgi* = *computer-generated imagery* | *Erebor*

(nomo) | *DOS* = la filmo *The Desolation of Smaug* | *AUJ* = la filmo *An Unexpected Journey* | *PJ* = la reĝisoro *Peter Jackson*

Ĝuste danke al konstanta praktikado, multaj lernas uzi la anglan en iu difinita fako. Kaj bedaŭrinde en multaj fakoj mankas okazoj por samnivele praktiki Esperanton. Tiam ne helpas, ke Esperanto, principe, havus pli simplan strukturon.

Zamenhof komprenis, ke lingvon povas fari facila kaj ĝia strukturo kaj la praktika ekzerciĝado en ĝi. En unu citinda Lingva Respondo li skribis:

Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto da bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon *absolutan*, tiam la libera uzado de lingvo artefarita fariĝos tute ne ebla, ĉar tiam malaperos ĉiu utileco de longa ekzerciĝado kaj en la deka jaro de uzado de la lingvo, kiel en la unua jaro, ĉiu devus konstante tro longe pripensadi kaj pesadi ĉiun sian vorton. Tamen la diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke, dum en la unua oni devas uzi *nur* tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formo pli logika estas *malpermesata*, – en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis, kaj li povas esti konvinkita, ke se lia formo estas efektive bona, ĝi baldaŭ trovos multajn imitantojn kaj iom post iom elpuŝos la malpli logikan, kvankam ĝis nun pli uzatan formon malnovan. (Lingvaj Respondoj 26)

Efektive, Esperanton faras facila ankaŭ unu socilingvistika trajto malofte menciata: *la manko de komunumo de denaskaj parolantoj*. Esperanto ja havas denaskajn parolantojn, sed ili ne formas komunumon, kiu decidus pri la ĝusta kaj malĝusta uzo de la lingvo. Kompreneble ankaŭ en la naciaj lingvoj la denaskaj parolantoj ne faras konsciajn decidojn, sed en tia komunumo la lingvo ĉiam komencas amasigi pli kaj pli da arbitraj reguloj. Se Esperanto estus lingvo de tia komunumo, oni verŝajne ne povus diri kaj *mi helpos vin* kaj *mi helpos al vi*, sed nur unu el tiuj strukturoj estus uzata, aŭ se ambaŭ, inter ili estus iu subtila semantika distingo (ekzemple, la dua estus uzata nur kiam oni alpruntas monon). En tia situacio lerni Esperanton kiel duan lingvon postulus pli da *ekzerciĝado* kaj ne helpus *logiko*, por uzi la terminojn de Zamenhof en la citaĵo ĉi-supra. La ekvilibro inter la du faktoroj estus alia, se la permesata variado en Esperanto estus tiel malvastigita.

Bedaŭrinde multaj esperantistoj klopodas puŝi la pesilon al la tute kontraŭa direkto kaj konstante cerbumas aŭ skribas en la reto pri tio, ĉu tiu aŭ alia Esperanta esprimo estas ideale logika aŭ ne. Mezurate per la mezuriloj de tiuj homoj, ni ĉiuj povas nur eraradi! Ni memoru la ekvilibron inter la "logiko" kaj "ekzerciĝado" de Zamenhof, aŭ inter la struktura L2-facileco kaj la praktikado de la lingvo, kaj komprenu, ke ankaŭ Esperanto estas nur kompromiso inter diversaj cirkonstancoj.

Jouko Lindstedt

Orienta taglibro (9)

15 aŭgusto 2014, la Ŝmita Duoninsulo kaj Oĥa

Lingvistikaj ekspedicioj ne estas tre konataj por la ordinaraj homoj, sed ĉiuj memoras

el la lerneja historio la grandajn eŭropajn ŝip-ekspediciojn, per kiuj oni malkovris Amerikon kaj aliajn fremdajn kontinentojn. Eŭropanojn pelis al ekspedicioj rakontoj pri riĉaĵoj troveblaj, sed ankaŭ ambicio, la nura deziro esti la unua en nova nekonata loko – vidi ion, kion neniu vidis pli frue. Sed la ideo "malkovri" landojn kaj kontinentojn, kie aliaj homoj jam vivis de miloj kaj miloj da jaroj, estis kompreneble terure eŭrop-centra. Veraj malkovristoj estis nur tiuj eŭropanoj, kiuj penetris la internon de Antarktio kaj grimpis sur la plej altajn montojn de la mondo.

Hodiaŭ, kiam la studentoj de nia Saĥalena ekspedicio ricevis liberan tagon, nin instruistojn trafis kvazaŭ malkovrista ambicio. Laŭ propono de Juha, ni decidis celi la plej nordan punkton de Saĥaleno, la Elizabetan Kabon de la Ŝmita Duoninsulo, ĉirkaŭ 90 kilometrojn norde de Oĥa. Grandaj lingvaj malkovroj ne estis atendeblaj, ĉar laŭ nia scio eĉ nivĥoj ne plu loĝas konstante en la duoninsulo. Sed estus solene stari tie, rigardi norden al la Oĥocka maro kaj pensi, ke tie fore trans la horizonto estas la granda orienta kurbiĝo de la orient-Siberia marbordo. Temis pri nenio pli racia.

Al la nordo estis veturontaj Juha, Janne, mi kaj unu el la studentoj, Andrew, koreisto-japanisto, kiu estas ankaŭ la oficiala fotisto de nia ekspedicio. Matene Juha kaj Janne tamen unue vizitis la regionan administrejon en la centro de Oĥa kune kun Katja por trakti pri ebloj iam fondi lingvonestojn por nivĥaj infanoj. Poste ili diris, ke la oficistino akceptinta ilin rilatis principe pozitive al la ideo, kondiĉe ke la finnoj trovu financadon por tia agado.

Andrew kaj mi sidis en la urba parko atendante ilin kaj rigardante mapon de Saĥaleno. En la nordo de la Ŝmita Duoninsulo estis simbolo de vilaĝo, sed kun la indiko "neloĝata". Ne estis klare, ĉu iris iaj ajn vojoj ĝis tie – en Rusio ja ekzistas multaj vilaĝoj, eĉ konstante loĝataj, kiuj estas atingeblaj nur per aviadilo aŭ boato. Laŭ mia takso estus jam bona rezulto atingi la 54an latitudon, kaj la Elizabeta Kabo estus ankoraŭ 25 latitudajn minutojn pli norde. Kiel veraj malkovristoj de la pasintaj tempoj, mi jam komencis pensi pri longitudoj kaj latitudoj!

Juha, helpe de Katja kiu tamen ne estis veturonta kun ni, konsentis pri veturo norden kun loka ŝoforo, kiu posedis japandevenan aŭton preparitan por malbonaj vojoj: vera ĵipo ĝi ne estis, sed ĝi estis ŝanĝita tiel, ke la ĉasio pendis pli alte for de la tero ol kiam la aŭto elruliĝis el la fabriko. La ŝoforo kunprenis sian junan edzinon; ŝi poste kolektis fungojn kaj berojn en ĉiu loko, kie ni haltis.

Unue, sufiĉe normala sabla vojo kondukis norden laŭ terkolo, kie en la plej mallarĝa loko nur ses kilometroj da tero apartigas la okcidentan kaj orientan bordojn de la insulo. Post la terkolo la insulo dislarĝiĝas kiel la Ŝmita Duoninsulo, sed nia ŝoforo sciis, ke la vojo surveturebla baldaŭ finiĝos. Ene de la duoninsulo eblus iri norden nur piede, kaj ankaŭ tiel nur teorie, ĉar praktike ĉiuj lokanoj tro timis ursojn por fari tiel. Tial ni turniĝis al kurba vojo, propre nur kavohava vojstreko, kiu serpentume kondukis nin al la okcidenta marbordo.

La marbordo estis nia sola eblo veturi norden. Maldekstre ni havis la maron, dekstre altan terklifon, sur kiu kreskis disaj arboj – kaj sur multaj el ili sidis gvatantaj maragloj. Inter la maro kaj la klifo estis larĝa sabla strando surveturigebla. Pli malfacile transireblaj estis nur lokoj, kie riveretoj el la interno de la duoninsulo fluis

en la maron. La malplena sabla strando daŭris kaj daŭris, kilometron post kilometro. Feliĉe oni ĉi tie ne konstruis plaĝojn kaj hotelojn, mi pensis, sed lasis la mevojn kaj fokojn vivi en paco. Nu, la mallonga somero ĉiuokaze ne promesus multe por ordinara turismo.



La Ŝmita Duoninsulo ne havas konstantajn loĝantojn kaj la vastaj strandoj estas en natura stato.



Rivereto atingas la maron falinte de la klifo kaj trafluante la strandan sablejon.

Sed baldaŭ ni devis halti, ĉar ni alvenis al loko, kie parto de la klifo ŝoviĝis ĝis la maro:



Nia aŭto (trovu ĝin en la foto!) haltigita de terŝoviĝo.

Ni grimpis sur la terŝoviĝon kaj piknikis:



Lingvistoj piknikas sur terŝoviĝo.

Post la pikniko estis mia tasko malsupreniri kaj porti la forĵetaĵojn al la aŭto. Bedaŭrinde mi ne sukcesis retrovi la imagatan padon inter la kruta flanko de la terŝoviĝo kaj la lageto malantaŭ tiu, kaj unu piedo mia falis en akvoplenan kavon inter la altaj herboj. La reston de la tago mi do devis surhavi malsekan ŝtrumpon en kota ŝuo (kaj vespere en la hotelo mi devis decidi, ke tiu ŝuparo restos en Oĥa por ĉiam).



Lageto naskiĝis malantaŭ la terŝoviĝo.

Ni ankoraŭ ne povis akcepti, ke la terŝoviĝo haltigis nian ekskurson. La ŝoforo kaj lia edzino restis ĉe la aŭto kaj ni kvar lingvistoj ekmarŝis norden laŭ la strando. Estus interese vidi almenaŭ trans la sekvan kurbiĝon de la bordo, malantaŭ tiun terkapon... sed ĝi kuŝis multe pli malproksime ol aspektis. La suno brilis kaj mi estis certa, ke almenaŭ iu el ni bruligos al si la haŭton, kaj tiu verŝajne estos mi. Sur la strando kuŝis morta foko. La maragloj observis nin de sur la klifaj arboj. Drivlignoj aspektis strangaj. Kaj mia ŝuo estis malseka.



Ĉi tie ni marŝis norden... sed la fora okcidenta terkapo estas pli malproksime ol oni kredus...

Janne kaj mi returnis nin unue, poste ankaŭ Juha kaj Andrew. Kiam ni remarŝis, subite nia aŭto veturis renkonte al ni! Montriĝis, ke venis malalta tajdo kaj la lertega ŝoforo sukcesis ĉirkaŭveturi la terŝoviĝon. Rekuraĝigite, ni ekveturis norden... sed baldaŭ nova terŝoviĝo, kun grandaj ŝtonoj ruliĝintaj ĝis la maro, definitive haltigis nian antaŭeniron.

Mia poŝtelefono kompreneble ne plu atingis iun telefonan kampon, sed ĝia navigilo asertis, ke ni atingis proksimume la nordan latitudon de 53 gradoj 57 minutoj. (Poste, kiam mi jam estis en la hotelo en Oĥa, Harri Laine raportis rete el Finnlando ke tiuloke en la aeraj fotoj de Google Earth estas videbla vere granda terŝoviĝo, komenciĝanta el la interno de la duoninsulo.)

Ni kompreneble bedaŭris, ke la ekskurso norden malsukcesis, sed decidis reveni al la vilaĝo, kiun ni vidis pli sude sur la klifo. Janne jam komencis ordigi siajn grandajn detalajn mapojn, helpe de kiuj li kutimis demandi la lokanojn pri la nomoj de riveroj kaj golfoj, lagetoj kaj montetoj.

Survoje ni devis dufoje helpi alian aŭton, kies veturantoj venis al la strando verŝajne por fiŝkapti. Nur kiam mi vidis, kiel facile tiu alia aŭto dufoje fiksiĝis je la kavoj sur la strando, mi komprenis, kiel lerta estis nia ŝoforo, kiu rapide stiris sian veturilon sur la sablejo, kiu ja neniel estis preparita kiel vojo.



Nivĥa vilaĝo en la Ŝmita Duoninsulo nune havas loĝantojn nur somere.

La gardohundoj en la nivĥa vilaĝo indikis, ke tie ĉeestis ankaŭ homoj – evidente nivĥaj familioj venintaj por fiŝkapti. La hundoj bojis kaj estis suspektemaj, sed lasis nin iri ĝis la domoj (jam en Nekrasovka ni rimarkis, ke la hundoj de la nivĥoj estas pli fidemaj kaj trankvilaj ol tiuj de la rusoj, se estas permesate ĝeneraligi). Tamen, neniam homoj troviĝis en la domoj: supozeble ĉiuj estis ie marborde.

En unu eksterdoma tenejo ni fine hazarde renkontis maljunan nivĥon, kaŭrantan sola sur la planko. Evidente li estis tro aĝa por sekvi la ceteran familion al la bordo. Ĉar li estis ne nur preskaŭ blinda, sed ankaŭ preskaŭ surda, ne eblis fari lingvistikan enketon... Li rigardis la preskaŭ dumetran Juha-n kaj demandis, ĉu tiu estas la prokuroro. Ĉu li iam estis vokita al tribunalo? Ĉu iu junaĝa krimo pezis sur lia konscienco? [Pli posta aldono: en Oĥa ni poste eksciis, ke verŝajne temis pri viro, kiu iam mortigis homon kaj devis restadi en malliberejo.]

Dum la tuta ekskurso ni vidis nur kelkajn homojn, kvankam ni restadis ĉe la sola iel-tiel aŭtebla parto de la duoninsulo. Mi povas nur imagi, kiom da sovaĝa naturo troviĝas ene de la duoninsulo, kaj kiaj estas la forlasitaj nivĥaj vilaĝoj multe pli norde, atingeblaj nur ŝipe aŭ fluge, aŭ per longega marŝado tra ursoplenaj arbaroj. Espereble la Ŝmita Duoninsulo estos iam deklarita natura rezervejo kaj definitive lasita por ursoj, fokoj kaj grandaj maragloj!

La centa UK

Kompreneble tio estas miaj personaj impresoj.

Granda travivaĵo. La unuaj duboj, kiuj fojfoje venadis en mian kapon, kaŭzitaj pro malsukcesa UK en Roterdamo en 2008 (100-jariĝo de UEA) pasis post la unuaj horoj pasigitaj en la kongresejo. Kaj la sekvintaj kongresaj eroj plifirmigis mian decidon: „tamen kongresi“. Eble la kongresejo (Lille Grand Palais) ne pentis pro grandeco (kaj beleco), sed por mi tio ne estis ĝena. Eĉ kontraŭe, mi sentis min pli „hejmece“, estis pli granda okazo renkonti hazarde iun serĉatan personon. La salonoj ankaŭ ne estis tro grandaj, do por amasaj programeroj kiel solena malfermo, fermo, nacia vespero, internacia vespero, kiuj amasigas plej multajn spektantojn oni dediĉis tri salonojn. La francoj solvis la situacion, miaopinie, tre saĝe. Estis unu granda salono, salono de Zamenhof, en kiu oni povis spekti senpere la okazaĵon. La saman okazaĵon oni povis spekti en du aliaj salonoj (Lapenna kaj Hodler) helpe de ekrano. La unuaj 1000 aliĝintoj havis la privilegion resti en la salono Zamenhof. Tia solvo permesis eviti miskomprenojn, kolerojn, okupadon de lokoj multe pli frue por kelkaj personoj ktp. Mi kun grupo da amikoj venis al Lille jam vendrede antaŭtagmeze. Post instaliĝo en la hotelo, kiu troviĝis tre proksime de la kongresejo, post ioma ripozo, ni iris viziti la urbon. Sabate matene ni iris al la kongresejo ricevi niajn kongresajn dokumentojn. Mi estis bonŝanca, ĉar tuj mi renkontis miajn japanajn amikojn. Ni tuj interkonsentis rendezuon post la lundo, por kune manĝi lunĉon. Posttagmeze ni denove vizitis la urbon per buso, kio daŭris du horojn, vespere estis kiel kutime la „movada foiro“. Ĝi okazis en la vasta halo de la kongresejo, troviĝanta sur la pli supra nivelo ol la enirejo/teretaĝo, kie lokiĝis servaj giĉetoj. En la halo (Michaux) troviĝis ankaŭ scenejo, sur kiu preskaŭ ĉiam dum la daŭro de la Kongreso io kultura okazadis. Tio havis kaj bonan kaj malbonan flankojn – bonan, ĉar tie oni povis aŭskulti kantojn, muzikon kaj samtempe iom ripozigi la piedojn, renkonti konatojn; malbona flanko – estis troa bruo, kio igis malkomforta kaj paroladon kaj aŭskultadon. Sed ĝenerale plaĉis al mi. Tie prezentiĝis tiuj, kiuj ne estis kvalifikitaj por sin prezenti en la aparta salono.

Kaj de la dimanĉo, post la malferma solenaĵo okazis normala kongreso kun multaj programeroj, libroservo, ekskursoj. Tre plaĉis al mi la nacia (franca) vespero, - kvankam ne ĉiuj ĝuis ĝin, sed ja diversaj estas gustoj- kiun gvidis Naturamiko – giganta figuro el la lokaj karnavaloj. Ĝenerale la Arta vespero havis nomon „Naturamiko kaj Kompanoj. La Naturamiko estas tiu karnavala figuro kaj Kompanoj estas tuta artista grupo prezentanta artan vesperon. La prezento estis tre bona, tre plaĉis al mi. La Kompanoj invitis ĉiujn kolektiĝi lunde je 12.00 antaŭ proksima stacidomo kaj kune iri al la teatra placo, kantante kaj disdonante la informmaterialojn. Tie ni plu kantis (krom mi, ja mia kantado forpelus la spektantojn), estis tre gaja etoso.

Kion mi spektis? Teatraĵon „Feliĉas ĉiuj“ – la teatraĵo tuŝanta problemon de enmigrintoj, estis tre bone prezentita fare de amatoroj. Alia teatraĵo kiun mi vidis (Ĉagrenegoj“) estis granda malreviĝo. La temo estas tre stulta eĉ kiel komedio. Du virinoj kriaĉis, ne eblis kompreni vortojn, oni pli divenis ol aŭdis pri kio temas. Tre bona estis prezento pri la vivo de Ursula Grattapaglia, en formo de monologo, kiun prezentis Malgosia Komarnicka el Pollando. En la programo estis planita prezenti

ĝin dufoje, sed pro la granda intereso oni permesis ĝin prezenti eĉ trian fojon. Eble iom kulpis la ne tro granda salono, en kiu ĝi estis prezentita, tamen en pli granda salono ne estis tia intima efiko, mi tiel opinias. La teatraĵo estis iom ilustrita per bildoj de Roman Dobrzyński, prezentantaj Bonan Esperon. En la kongreso partoprenis gesinjoroj Grattapaglia.

Tre interesa estis prelego „Eŭritmio“ – ĝi estas movo-arto, kiu videbligas la paroladon kaj kantadon. La unuan fojon mi vidis tian arton. Kaj fakte ne tro komprenis.

Du tagojn mi dediĉis al ekskursoj. Marde mi busveturis al Boulogne-sur Mer. Granda travivaĵo – ni haltis ĉe la placo antaŭ la stacidomo, kie venis en 1905 Ludoviko Zamenhof mem kun la edzino por la unua Universala Kongreso de Esperanto. De tie ni iris al la teatro, en kiu okazis tiu Kongreso kaj kiu funkcias ĝis nun. Ni sidiĝis komforte kaj sur la sceneja ekrano aperis Gijom' Armide, la franca kantisto, kiu bonege elparolas Esperanton, kaj tralegis la paroladon de L.Zamenhof, kiun li diris dum la unua UK. La atmosfero estis tre kortuŝa. Sur la urbodomo de Boulogne flirtis dum la tuta semajno la esperanta flago.

Alia ekskurso, kiun mi partoprenis, estis ekskurso al Ipero (Iper, Ypres) Passchendaele-Muzeo kaj Unua Mondmilito (Belgio). Por mi tiu estis ankaŭ tre interesa. Krom la muzeon ni vizitis du tombejojn – la germanan kaj la anglan, kiuj estas prizorgata de tiuj du ŝtatoj. Ĉar la kostoj kaj eblecoj transporti mortintajn soldatojn al la patrujo estis tro grandaj, oni establis surloke (loko de plej grandaj bataloj en 1915) tombejoj kaj ĝis nun zorgas pri ili. Ambaŭ tombejoj faras grandan impreson – sennombra listo de mortintoj. Kaj pro kio? Tiom da viktimoj – mortintaj, kripligitaj korpe kaj mense. La germana tombejo, kiun ni vizitis, troviĝas en Langemark kaj ĝi ne estas la unusola germana milittombejo en Belgio. Terurigas la nombro da viktimoj – nur sur tiu unusola tombejo estas enterigitaj pli ol 44 000 soldatoj, inter ili ĉirkaŭ 15% estis studentoj kaj lernejoj volontule aliĝintaj al la armeo. La alia tombejo, kiun ni vizitis, estas Tyne Cot, kie estas enterigitaj 12 000 soldatoj de Brita Komunumo de Nacioj, do ne nur angloj, sed ankaŭ homoj el la britaj kolonioj. Sur la muroj de la tombejo estas ĉizitaj nomoj de 35 000 soldatoj perdiĝintaj, kies korpojn oni ne trovis.

Teruraj ciferoj!!! Malantaŭ ĉiu kaŝas sin ies patro, filo, edzo, amiko ktp.

Ni vizitis ankaŭ la urbon Iper (Ypres) komplete detruitan dum la Granda Milito dum kvar jaroj de bataloj. Mirinde bela estas nun la urbo, tre detale rekonstruita jam en la dudekaj jaroj de la XX jarcento.

La urba pordego estas samtempe triumfa arko. Sur ĝiaj muroj oni ĉizis nomojn de 54 000 perdiĝintaj soldatoj. Ĉiutage, de la fino de la Granda Milito ĝis hodiaŭ, je la 20.00 horo estas ludata „Last Post“ (ĉu oni povas traduki ĝin kiel „la lasta posteno“?).

Kaj mi revenas al Lille, al la kongresejo. Ĉar du tagojn mi pasigis ekskursante, jaŭdon mi dediĉis al kelkaj programeroj, el kiuj plej plaĉis al mi prelego pri Francio - Eta Pollando. Ĝi temis pri granda manko de viraj fortoj post la Unua mondmilito, do estis necese enigi, venigi enmigrintojn. Inter ili estis multaj poloj. La franca registaro pagis eĉ la vojaĝon por enmigrintoj. Ili laboris en minejoj kaj agrikulturo. Venis kompreneble ankaŭ junaj viroj, kiuj ofte edziĝis kun lokaj virinoj kaj restis por ĉiam en Francio. Aliaj venigis siajn familiojn, ankoraŭ aliaj preferis tamen reveni en sian propran landon. Inter tiuj estis mia patro. Eble pro tio la prelego elvokis en mi

grandan emocijon. Prelegis poldevena viro, kies gepatroj venis al Francio kaj restis tie. Li naskiĝis jam en Francio.

Intertempe mi vizitis kelkfoje la libroservon, kiu ne estis tiel riĉa kiel kutime, tamen estis sufiĉe multaj interesaj libroj, kiuj vekis mian emon aĉeti ... Sed mi aĉetis modeste ... nur kvar librojn. Vespere mi ĝuis piankoncerton. Ĉar la kongresejo ne disponis pri sufiĉe multaj salonoj, iuj programeroj okazadis en aliaj lokoj de la urbo. Tio ankaŭ rabis tempon por iri aliloken.

Vendredo estis la antaŭlasta kongresa tago. Mi ŝatis pasigi kelkajn horojn kun mia japana amikino, do ni migris tra la urbo, vizitis citadelon, kie estas belega parko kaj eĉ zoo-ĝardeno. Sed antaŭ ol iri al la urbo mi partoprenis interesan aranĝon – la japano Horu Yasuo havas interesajn konceptojn. Unu el ili estas instigi esperantistojn scii parkere la esperantan himnon. Li faras specialan ateston, kiun li enmanigas al personoj, kiuj antaŭ li kantas la himnon. Do dum tiu programero unue ni trifoje kantis la himnon kaj poste volontuloj-kuraĝuloj sin prezentis. Ses personoj/kuraĝuloj sukcese ekzameniĝis. Mi ekzameniĝis jam pli frue, do mi ne devis. Vespere okazis internacia arta vespero. Ĉifoje la kongresanoj havis eblecon elekti kion ili volas rigardi dum la arta vespero. Pli frue dum du horoj kaj duono en unu el la salonoj prezentiĝis soluloj kaj grupoj, kiuj ŝatus prezenti sin dum la internacia arta vespero kaj la spektantaro per aplaŭdoj voĉdonis. Mi ne partoprenis, ĉar mi partoprenis aliajn programerojn. Sed plaĉis al mi la elektitaj eroj. Sed pli frue ol la internacia arta vespero okazis futbalmatĉo pri Pokalo Zamenhof. Ludis – Elektitaro de Esperanto kontraŭ Elektitaro el Okcidenta Saharo. Kaj okazis io neatendita, neakceptebla. Post la unua duono de la matĉo, kiam la esperantistoj eniris vestejon, ili rimarkis, ke iliaj aĵoj estas ŝtelitaj. Do la matĉo ne plu daŭris, la dua duono finiĝis en policejo. Tiamaniere la matĉo restis ne finita. Malagrable afero.

Kaj venis sabato, solena fermo de la kongreso, resumo kaj adiaŭo. Tre kortuŝe finiĝis tiu fermo – oni adiaŭis Osmo Buller, multjaran ĝeneralan direktoron de UEA, kiu emeritiĝos venontjare marte (probable), la nepo de L.Zamenhof, Luis –Christophe Zaleski-Zamenhof ankaŭ la lastan fojon partoprenis UK-on. Lin anstataŭos estonte liaj du filinoj. Unu el ili partoprenis la kongreson. Li mem sentas sin laca, li estas 93-jara. Sed la plej neatendita kaj ne planita ero okazis kiam Peter Baláž, fama slovaka esperantisto, svatiĝis (proponis edziniĝon) al sia plurjara pola koramikino Dorota Rodzianko, kiu lian proponon akceptis, ĉe vigla aplaŭdo de kongresanoj.

Post la reveno kiel kutime mi sentas nesufiĉecon – multajn kongresajn erojn mi preterlasis, ja oni ne povas esti en kelkaj lokoj samtempe. Tamen mi renkontis multajn konatojn, ankaŭ tiujn, kiujn mi konis nur rete aŭ skajpe. Kaj ankaŭ rememoroj restas por mi. Neforgeseblaj rememoroj. Mi rememoros ĝin kiel unu el la plej sukcesaj UK.

Dorota (http://www.ipernity.com/blog/dorota_dorburc)

La 100-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Lillo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015

Cent dek jaroj pasis de post la unua Universala Kongreso okazinta en Bulonjo-ĉe-Mar. Ĉi-foje oni elektis kiel kongresurbon Lillo en nord-orienta parto de Francio. La kongreso okazis en la moderna konstruaĵo *Lille Grand Palais*. Al ĝi enskribiĝis 2689 personoj el 81 landoj de kvin kontinentoj: rekorda nombro da partoprenantoj de UK-

oj okazintaj en la 21a jarcento. Informoj pri la evento estis bone disvastigitaj. En la urbo aperis multaj afiŝoj pri la aranĝo kaj pri la publika programo, kiu okazis ĉiutage posttagmeze sur la placo de la Teatro. Prezentiĝis diversaj muzikgrupoj inter kiuj ne mankis JoMo, La Kompanoj, Kapriol, Kajto.

La temo de la kongreso estis: "Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj". La programo estis varia kaj riĉa kun interesaj prelegoj, diskutoj, debatoj, E-kursoj kaj lingvokursoj, KER-ekzamenoj, filmoj, teatraĵoj, koncertoj, ekspozicioj, spektakloj kaj muzikaj prezentoj. Ĝi montris ampleksan kulturon kreitan de esperantistaro. Libroservo prezentis abundan kaj varian stokon da libroj, T-ĉemizojn kaj aliajn esperantaĵojn. Okazis multnombraj eroj kaj aktivaĵoj. Kunvenis akademianoj, medicinistoj, fervojistoj, ateistoj, spiritistoj, bahaanoj, komunistoj, juristoj, blinduloj, skoltoj, vegetaranoj, komercistoj, matematikistoj, radioamatoroj, nefumantoj, kat-amantoj, SAT-anoj, legantoj de la revuo "Esperanto". Plurfoje estis pritraktita la kongresa temo, okazis IKU-prelegoj kaj serio da prelegoj pri Francio, vinseminario, oratora konkurso. Formiĝis internacia koruso sub gvido de Alan Bishop el Aŭstralio.

La poresperanta programo komenciĝis per Movada Foiro. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj aranĝoj dum la UK-oj. Tie sur 120 tabletoj diversaj asocioj prezentis allogan E-materialon kaj informis pri sia agado. Ĝi estas granda renkontiĝejo kun malnovaj kaj novaj amikoj.

Dimanĉe okazis la Solena malfermo de la kongreso. Unuafoje en la historio de la Universalaj Kongresoj ĝi estis rekte elsendita per interreto. Esperantistoj el pluraj partoj de la mondo povis sekvi ĝin. Kortuŝa estis la salutparolado de Louis Christoph Zaleski-Zamenhof, la nepo de la Majstro. La solenaĵon ĉeestis kaj alparolis la publikon ankaŭ la alta protektanto de la 100-a UK, la urbestro de Bulonjo-ĉe-Marco Frédéric Cuvillier.

La kongresa kuriero *Belfrido* ĉiutage informis pri novaĵoj, ŝanĝoj kaj aldonis liston de novaj kongresantoj. Ankaŭ la loka gazeto *La Voix du Nord* (La Norda Voĉo) ĉiutage informis pri kongresaj eventoj. Ne mankis intervjuoj kaj televid-elsendoj.

Veronika Poór estis elektita Ĝenerala Direktoro de UEA. Indonezio estis akceptita kiel nova Landa Asocio. Dekdu esperantistoj ricevis diplomon pri elstara agado kaj pri elstara arta agado. Okazis belartaj konkursoj kaj la tradicia aŭkcio, unu el la viglaj kaj ŝatataj programeroj (spektaklo), kiun majstre gvidas jam de kelkaj jaroj Humphrey Tonkin. Koreoj invitis kongresi en la jaro 2017 en Seulo, slovakoj - venontjare en Nitro. Junuloj havis abundajn kaj buntajn programerojn kaj amike amuziĝis. Infanoj ĝuis sian kongreseton. Same kiel lastjare ankaŭ ĉi-foje okazis futbalmatĉo. Nia teamo konsistanta el entuziasmoj tamen perdis 0-4 kontraŭ skipo de *Okcidenta Saharo*.

La kongresanoj havis eblon partopreni en diversaj ekskursoj biciklaj kaj busaj al Parizo, Amieno, Arraso, Bruĝo kaj al aliaj lokoj. La plej alloga estis tiu al Bulonjo-ĉe-Marco. Tie oni vizitis la teatron Monsigny, kie okazis la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1905. La prezidanto de UEA Mark Fettes citis la tiaman paroladon de Ludoviko Zamenhof. Centoj da esperantistoj paradis tra la stratoj kun afiŝoj kaj flagoj al la monumento de Zamenhof antaŭ la stacidomo kaj poste al la urbodoma akcepto. Tie post la paroladoj la esperantistaro estis regalita per vino, biero, diversaj sukoj kaj manĝaĵetoj. Vespere Guillaume (Guijom') Armide, la franca talenta muzikartisto preleg-koncertis en la bulonja teatro por la ĝenerala publiko, sed bedaŭrinde venis tre malmultaj personoj.

La 1-an de aŭgusto la jubilea 100-a Universala Kongreso de Esperanto finiĝis. Dum la tuta semajno akompanis nin la giganto Zamenhof. Oni resumis la semajnan aranĝon, disdonis diplomojn pro la kvadekjara kaj kvindekjara membreco al UEA. Antaŭ la fino

prezentiĝis sur la podio infanoj el Infana Kongreseto kaj kantis por la publiko. Gijom' Armide pianludis. Al Ĝenerala Direktoro Osmo Buller estis transdonitaj donacoj pro lia venontjara emeritiĝo. Clay Magalhães dankis kaj disdonis rozojn al ĉiuj LKK-anoj kaj al la helpantoj. Post la transdono de la verda standardo al la reprezentantoj de la LKK en Slovakio Petro Baláž kaj la urbestro de Nitro sincere invitis la ĉeestantaron al la 101-a UK, okazonta tie venontjare. Laste kaj neatendite por ĉiuj Petro Baláž petis edziĝon al sia pola koramikino Dorotka Rodzianko antaŭ kelkcentoj da spektantoj kaj donacis al ŝi fianĉrington. Fine estis kantata la Esperanto-himno *La Espero*.

Liba Gabalda

La 88-a SAT-KONGRESO

8-15. 8. 2015

Okazis en la slovakia urbo Nitra situanta 90 km for de la ĉefurbo Bratislava. La eventon partoprenis pli ol kvindeko da esperantistoj el dek ok landoj. La plej foraj kongresanoj alvenis el Aŭstralio, Argentino, Ĉinio, Japanio, Koreio, Madadaskaro kaj Usono. Inter la partoprenantoj estis pluraj gejunuloj, kiuj aktive intervenis kaj kontribuis al la programo.

Bonvenigis nin la ĉeforganizanto de la kongreso Peter Baláž. La kongresejo troviĝis en la universitata student-hejmo "Anton Bernolák". En la akceptejo estis instalitaj tri libroservoj, surmure ekspoziciitaj glumarkoj kaj E-bildkartoj el privata kolekto. Ĉe alia flanko pendis pluraj T-ĉemizoj kaj sur la tabloj kuŝis aliaj esperantaĵoj por vendado. En apuda ĉambro ni admiris ekspozicion de diversspecaj bildoj.

Antaŭ la inaŭguro oni prezentis kelkajn rimarkindajn ĵus eldonitajn librojn de la SAT-eldonejo, de la hispana Sateh kaj Peter Baláž prezentis sian kolekton. Poste oni legis kelkajn salutmesaĝojn. La organizanto prezentis skize la programon de la semajno. Dum la kongreso okazis kvar laborkunsidoj, socialaj forumoj pri Grekio, Usono, Latin-Ameriko, Mezoriento kaj Orienta Azio, raportoj pri laborgrupoj kaj jarraportoj. Kunvenis liberecanoj, komunistoj, sennaciistoj, vegetaranoj, verduloj, LEA-komitato. Ni estis informitaj pri Vikipedio, pri pretigado kaj farado de Sennaciulo, pri PIV, pri programo kaj planoj de E@I. Stano Marček prelegis pri fungoj kaj informis pri siaj lernolibroj *E-o per rekta metodo*. Pri la familio kaj la verkoj de la fratoj Josef kaj Karel Čapek parolis Petr Chrdle. Aldoniĝis prelego pri ŝovinismo prezentita de Johan Derks. Kun Peter Baláž oni diskutis pri la temo *Ĉu ni pretas je grandaj ŝanĝoj*. Estis ellaborita kaj akceptita la Gvidrezolucio, en kiu oni krom aliaj gravaj punktoj substrekas la neceson respekti la liberon de penso kaj la privatecon de la homaro.

Dum la unua duontaga ekskurso ni promenis tra la urbo Nitra piede kaj trajnete ĝis la katedralo. Ni vizitis ĝin kaj poste ni gustumis la mezepokajn trinkaĵojn preparitajn surbaze de herboj kaj kafon el glanoj spicitan per cinamo kaj kariofilo. Poste ni vizitis sinagogon, kiu nuntempe utilas kiel koncertejo. Kontraŭ ĝi en bele ekipita teejo ni gustumis kelkajn specialajn teojn kaj kuketojn. Nia japana samideanino Hideko Huĝimoto sukcese prezentis kaj parolis pri la teo-ceremonio laŭ japana maniero. La dua duontaga ekskurso kondukis nin al urbo Topolčianky, kie ni vizitis ĉevalojn. Tie oni bredas plurajn rasojn de ĉevaloj. Inter ili troviĝas ĉevalo, simbole donacita al la brita reĝino Elizabeth II dum ŝia vizito en Slovakio la 24-an de oktobro 2008. La

reĝino kontribuas al ties zorgado kaj oni povas rimarki, ke la "reĝa" ĉevalo estas pli bone prizorgata ol la aliaj. Poste ni vizitis burgon de la 15-a jarcento. Ĝi estas nacia kultura heredaĵo. Laste ni vizitis la vinproduktejon sen la promesita gustumado.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la historia urbo en meza Slovakio Banská Štiavnica. Ĝi estas konata pro minado de metaloj, ĉefe de arĝento. Unue ni vizitis la mineralogian ekspozicion kun multegaj, diversformaj kaj raraj belkoloraj ŝtonetoj. Post la tagmanĝo ni vizitis la minejon. Ekipitaj per kaskoj, mantelo kaj lanterno ni subteriĝis kaj paŝadis tra malhelaj koridoroj de la eksa minejo imagante la pezan laboron de tiama ministoj. La urbo estas enskribita en la Unesko-listo de kulturaj heredaĵoj. En ĝi troviĝas la plej granda kripo *Banskoštiavnický Betlehem*, kiun kelkaj el ni ankaŭ vizitis.

La vesperaj kulturaj programeroj konsistis el prezento de slovaka popolmuziko, vingustumado kaj dancado, filmoj "Civitano 4" kaj "Ni ne plu estu sklavo". Teatraĵon R.U.R. prezentis studentoj el la urbo Svitavy. Koncertis por ni la muzikgrupo "No problem" el Ĉeĥio kaj Attila Schimmer el Aŭstrio regalis nin per kantoj el sia repertuaro kaj akrobataĵoj. Dum la adiaŭa vespero ni aŭskultis kantojn, gitarludadon kaj s-ino Tahira Masako el Japanio sukcese aŭkciis kelkajn esperantaĵojn. La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero.

La venontjara Sat-kongreso okazos en Herzberg - La Esperanto-urbo de la 16-a ĝis la 23-a de julio 2016.

Liba Gabalda

100.000 REGISTRIGOJ POR LA ESPERANTO-KURSO ĈE DUOLINGO

Hieraŭ registriĝis la 100.000-a t.e. CENT-MILA persono por lerni Esperanton pere de la anglalingva kurso ĉe la retejo Duolingo! La kurso ekzistas nur ekde la 28-a de majo, ĝi ankoraŭ estas en la beta fazo, sed jam ekzistas pluraj personoj, kiuj sukcese finis ĝin!

Reteja adreso: <https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>

Gratulon al la prizorgantoj kaj funkciigantoj de la projekto: Chuck Smith, Ruth Keves-Cohen kaj sep aliaj personoj!

Ret-Info, LS

Rim.d.l.red.: Ĉi-supre vi legis la originalan, jam ne tute aktualan informon de Ret-Info. Intertempe la kurso havas jam 166.000 (!) lernantojn, laŭ stato de la 28-a de oktobro.

...kaj tute nova:

DUOLINGO-KURSO POR HISPAN-PAROLANTOJ EKPREPARATA

Ĵus komenciĝis ĉe Duolingo la preparado de "Esperanto for Spanish speakers" - <https://incubator.duolingo.com>, en Incubation Phase 1. La preparado de la versio por anglalingvanoj daŭris proks. dek monatojn - supozeble ĉi-foje pretiĝos pli rapide... :)

Intertempe estas registritaj 165.000 Esperanto-lernantoj en la angla lingvo ĉe duolingo.com; proks. 1100 novaj lernantoj tage. Vidu ĉe Incubation Phase 2.

Listo de pliaj retaj Esperanto-kursoj ĉe: <http://tinyurl.com/lingvolerniloj>

Tie troveblas ankaŭ retaj vortaroj, aŭtomataj tradukiloj, lingvoludoj, kartaroj por vortolernado, perado de instruistoj kaj konversaciaj partneroj ktp.

Konstateblas, ke 90 % de la retaj senkostaj lingvopaĝoj kun almenaŭ 25 lingvoj havas nun ofertojn ankaŭ en Esperanto. Kial? Nu, eble tiu ĉi prelego helpas klarigi la kaŭzon: <http://www.esperantoland.org/dosieroj/LaLongaVosto.pdf>

Lu Wunsch-Rolshoven

EsperantoLand
<http://www.esperantoland.org/nr>
lu.esperanto@gmx.de

Ret-Info, LS

Kaj jen ankoraŭ alia tute nova oferto por germanlingvaj lernemuloj:

Esperanto lernen auf Lingolia

Willkommen auf den Esperanto-Seiten von Lingolia

<https://esperanto.lingolia.com/de/>



Hast du dich auch schon einmal gefragt, warum Sprachen eigentlich immer so kompliziert sein müssen? Gibt es keine einfache Sprache, die ohne schwierige Grammatikregeln auskommt?

Du wirst staunen, so eine Sprache gibt es wirklich. Sie heißt Esperanto und hat bereits viele Fans auf allen Erdteilen. Warum also nicht ein bisschen Esperanto lernen und dann die Welt bereisen? *Havu plezuron!*

Grammatik

Im Vergleich zu anderen Sprachen ist die Grammatik in Esperanto richtig einfach. Es gibt nur wenige Regeln, keine Ausnahmen – alles hat seine Ordnung.

Wortschatz

In diesem Bereich gibt es Wortlisten sowie kleine Übungen zu unseren Kalenderblättern. Außerdem erklären wir hier Silben zur Wortbildung in Esperanto.

Hintergrundinfos

Was ist Esperanto überhaupt? Warum gibt es Inhalte zum Esperantolernen auf Lingolía? Wieso sollte man Esperanto lernen und wo kann man die Sprache sprechen? Antworten auf all diese Fragen gibt es hier.

Dankon

Wir bedanken uns recht herzlich beim Esperanto-Zentrum in Herzberg für die tatkräftige Unterstützung. Ohne die große Hilfe von Zsofia und Peter wäre die Esperantoseite von Lingolía wohl noch lange Zeit nur eine nette Idee geblieben.

Tre interesa numero de EŬROPA BULTENO

Eŭropa Bulteno estas eldonata de Eŭropa Esperanto-Unio, EEU, sub redakto de Zlĵatko Tiŝljar. Ĉiuj numeroj estas interesaj, sed la lasta, aŭgusta numero meritas apartan atenton...

Mi volas mencii nur 2 elstarajn artikolojn:

Du ideologioj

- Pensiga artikolo de Z. Tiŝljar pri la kernaj ideologiaj problemoj de la Esperanto-movado. Ne por komencantoj kaj novuloj...

Baza vortlisto por komencantaj kursoj

- Prezento de la fama "Zagreba Metodo", de la nova esploro de Raymond Gerard pri ofteco de vortoj kaj morfemoj en Esperanto, kaj de la rezultanta Baza Vortlisto, rekomendata por la komencantaj kursoj!

Reteja adreso de Eŭropa Esperanto-Unio estas <http://www.europo.eu> - la bultenoj estas elŝuteblaj en la ĉefa paĝo.

La aŭgusta numero estas rekte elŝutebla ĉe:

<http://www.europo.eu/ge/documentloader.php?id=439&filename=eb-151-2015-08.pdf> .

Ret-Info, LS



Ĉu Silvestra renkontiĝo? Ĉu de Germana Esperanto-Asocio? Ho, kio estas tio? Tio verŝajne estas via reago legante tion ĉi.

Sed vi prave legas: Germana Esperanto Asocio ekde la jarfino 2015 ofertos novan silvestran renkontiĝon!

La unua LUMINESK' okazos en Nideggen (Eifel) inter la 28.12.2015 kaj la 04.01.2016!

Ĉefa kontaktpersono: Andreas Diemel

Pliaj kontaktinformoj: <http://luminesk.eo.tel> ([link is external](#))

La vana instruo de Franz Jonas

En februaro oni eksciis, ke “Rusia sekcio de laborgrupo de UEA pri Esperanto en la BRICS-landoj” skribis al prezidento Putin kaj ĉefministro Medvedev por pledi, ke Esperanto transprenu la rolon de la angla en la komunikado inter la BRICS-landoj, precipe Ruslando, Brazilo kaj Ĉinio. Kun aplomba memfido la aŭtoroj de la letero promesis “ĉian eblan helpon” en kunmetado de agadplano por atingi tiun celon. Ili aŭguris, ke el ĝia realigo sekvus kresko de la prestiĝo de Ruslando en la mondo kaj ĝia liberiĝo el la dependeco de Okcidento, al kiu la angla lingvo katenas ĝin kaj la aliajn landojn de BRICS.



Laborgrupo de Universala Esperanto-Asocio
pri Esperanto en BRICS-landoj
Рабочая группа Всемирной Эсперанто-Ассоциации
«Эсперанто в странах БРИКС»

09.02.2015

ОТКРЫТОЕ ПИСЬМО

Президенту Российской Федерации
В.В. ПУТИНУ

UEA distanciĝis de la letero kaj anoncis, ke ĝi tute ne havas laborgrupon pri Esperanto en BRICS-landoj, kaj ke tial ankaŭ ne povas ekzisti ĝia sekcio en Ruslando. Aparte rimarkinde estas, ke la unua subskribinto de la letero estis Miĥail Ĉertilov, unu el la kotizperantoj de UEA en Ruslando. Oni ankoraŭ ne scias, ĉu UEA konsideras disciplinajn agojn kontraŭ li pro nerajtigita uzo de ĝia nomo por ŝajnigi, ke la letero apogas sin al aŭtoritato, kiu eĉ havas

konsultajn rilatojn kun UN kaj Unesko, kion ili emfazis tuj en la unua alineo. Se UEA eĉ ne riproĉas Ĉertilov, kiu en la asocio plenumas nur teknikan taskon sen rajto paroli en ĝia nomo, ankaŭ aliaj esperantistoj povos senti sin liberaj glui la nomon de UEA sur siaj fantaziaj proponoj al naciaj kaj mondaj gravuloj kaj organizaĵoj. Por gardi sian aŭtoritaton en la movado UEA devus zorgi, ke en ĝia nomo elpaŝu nur tiuj, kiuj havas la rajton je tio. Aliaj estu ĝustatempe haltigitaj, kaj se tio ne eblas, oni apliku kontraŭ ili taŭgajn agojn ekde riproĉo ĝis eksigo.

La letero atestas pri granda politika naiveco kaj verŝajne eĉ ne atingos tion, kion atingis Probal Dasgupta. Antaŭ kelkaj jaroj li pioniris pri simila korespondado, skribante al ĉiuj ŝtatestroj de la landogrupo, kiun Ĉertilov k. a. revis konkeri nur tra Putin kaj Medvedev. La tiama prezidanto de UEA ricevis ĝentilan respondon el Brazilo fare de iu kancelaria oficisto, kiu nome de prezidento Lula esprimis ties laŭdiran konsenton, ke Esperanto estas bela afero. Dasgupta almenaŭ havis la rajton sendi leterojn nome de UEA, eĉ se nur por perdi tempon.

Finvenkisma revpensado kaj primitiva desuprismo firme persistas inter esperantistoj. Realismo kaj aferkono fremdas, kiam ili sturmas por persvadi politikistojn.

Antaŭ la enoficiĝo de Obama oni kolektis subskribojn, por ke li enkonduku Esperanton en usonajn lernejojn. La iniciatinto estis por momento akklamata kiel heroo de la movado, kvankam li ne sciis, ke en Usono la prezidento ne okupiĝas pri tiaj aferoj.

Eĉ kiam ŝtatestro mem estas esperantisto, li ne sukcesas semi realismon ĉe siaj samideanoj. Prezidento Franz Jonas admonis en la Viena UK en 1970, ke esperantistoj fidu sian propran forton kaj ne atendu ion de politikistoj, ĉar “se la Esperanto-movado estas forta, la oficialaj institucioj de si mem agnoskos ĝiajn gravecon kaj signifon.” Intertempe la lingvo kaj ĝia movado perdis multon de sia forto, ĉar esperantistoj nombras nun malpli ol antaŭ 45 jaroj. La vortoj de Jonas tre aktualas, sed ju malpli multaj ni iĝas, des pli niaj zelotoj leteras al prezidentoj.

Komitatano Z

La Ondo de Esperanto, 2015, №4-5 (246-247).

Guram Svanidze (Kartvelio)

Franclingvano

Tiu ĉi junulo kaj mia fratino estis samklasanoj, tamen nelonge, la unuajn ses jarojn. Poste mia fratino translokiĝis el nia urbo al Tbiliso, al la avinjo. La lernejon li finis kvin jaroj pli frue ol mi kaj forveturis al Rusio. Pasis precize 17 jaroj post kiam ankaŭ mi finis la lernejon kaj 22 jaroj post kiam mi vidis lin lastan fojon. Memori tiun ĉi junulon ne estis aparta kaŭzo, nur eble pro tio, ke foje en la lerneja korto li alvokis min kaj demandis pri Dina (nomo de mia fratino)... Kaj jen en malvarma mateno starante jam la kvaran horon en tbilisa¹ vico por pano en komenco de naŭdekaj jaroj, mi streĉe rememoris lian familinomon. En la vico min anstataŭis la bopatrino. Mi iris hejmen, poste laborejen kaj daŭre ĝis doloro streĉigis mian memoron. Kiam pro paneo de elektro en metrotunelo haltis trajno, en mallumo kaj plendado de pasaĝeroj abrupte venis la ideo: “Lia nomo estas Vasja Dudnik!”

Post 5 tagoj oni telefonis al mi. Parolis usonanino. Kolegino-sociologo invitis min partopreni projekton pri problemoj de malriĉeco.”Dajan Dudnik”, – sin prezentis ŝi. Mi iĝis menaĝero de la projekto. Estis pri kio

¹ Tbiliso – la ĉefurbo de Kartvelio

fieri kaj ĝoji – Dajan elektis min el multaj pretendantoj, kaj honorario (timindas diri kiom oble) superis mian salajron, kiu tiumomente estis 2 usonaj dolaroj en rekalkulo je loka mono. En la auto, kiam ni veturis al Kahetio², kie devintis fari parton de esploroj, mi – jam menaĝero – rakontadis al la usonanino pri la okazintaĵo kun Vasja Dudnik, ŝia samnomulo el fora kartvela vilaĝo. Parenca ligo ne eblis. Dajan estis usonanino en la kvara generacio. Ŝia praavo, provinca hebreo el Ukrainio venis al Usono en komenco de la 20 jarcento. Preskaŭ mistera historio al ŝi ekplaĉis aŭ, povas esti, mia angla lingvo estis bonnivela. “Super!” – tranĉis la usonanino “tre” ruse kaj ruĝiĝis. Ŝia maniero ruĝiĝi ĉarmigis min. Kaj ne nur min, sed ankaŭ ĉiujn 45 partoprenantojn de la projekto, kiuj feliĉis iĝi ĝiaj anoj.

Ĝenerale Dajan preferis paroli pri la esplorobjekto – malriĉeco. En agrabla maja tago nia “Fordo” senbrue portis nin preter vitejoj. Ŝi pridemandadis la stiriston Sergo kion li manĝis matene. Li estis kuracisto-terapeŭto kaj kromlaboris kiel stiristo en nia projekto. Tiu ĉi cirkonstanco aparte ekincitis la usonaninon, ŝin trafis esplora ardo. “Ne ofendiĝu, ellerni malriĉecon en Kartvelio ŝi komencis de mi”, – diris mi al li kartvele. Sergo ne kontraŭis kaj respondis al la demandoj detale, interalie en la angla. Ŝi notadis. Evidentiĝis, ke respondinto hieraŭ dense tagmanĝis: li vizitis amikojn, kie oni regalas lin per tolmao – kuirita vianda farĉaĵo envolvita en juran vinberfolion. Sergo kapmontris al vitejoj. Tie laboris kamparanoj plenfamilie. Estis periodo de maldensigado de arbustoj. Forŝiritajn foliojn oni metadis en sakojn. Dajan estis konsternita. Fakto kun tolmao ne kongruis kun ŝia skemo de malriĉeco.

Ni envenis la urbeton proksimume je la unua horo posttagmeze. Ĝi aspektis dezerta. Nur bovinoj kaj porkoj – nepra atributo de provincaj urbetoj pigrece vagadis en senhomaj stratoj. “Vink-vink”, – sincere ridante eldiris Dajan kaj montris per fingro al malfruiganta porkino, kiu trotetis la vojon rekte antaŭ “Fordo”. Tiel en la angla sonas “grunt-grunt”.

La suno ekbrilegis. La auton ni lasis en ombro de grandegaj maljunaj tilioj ĉe la skvaro. Verŝajne poreterne konstruita ŝtona barilo kun gipsaj dekoraĵoj en formo de vinberaj grapoloj malfarbiĝis, en kelkaj lokoj forfalas. Trans la placo, kontraŭ la skvaro situis loka urba domo. Ĝi aspektis pale kompare al la grandegaj privataj domoj ambaŭflanke de ĝi. Iliaj zinkaj tegmentoj

blindigis ĉirkaŭaĵojn per rebrilo de suno. En la kontoro estis neniuj. Ni revenis al la skvaro. Tie sidis viroj, eble kvin kaj ludis nardojn. Kiam ni alproksimiĝis, ili vigliĝis. Ekaŭdiĝis komentoj, kiuj estas tiuj eksterlandaj turistoj-okulvitruloj (mi kaj Dajan), verŝajne fotados, kaj kiu fotojn ricevos? Mi salutis ilin. Ili pli vigliĝis. El iliaj vortoj eblis kompreni, ke urba loĝantaro nun estas en vitejoj. “En la urbo nunas nur senfortaj olduloj, handikapuloj kaj pigruloj,” – rimarkis unu pufventra viro, la plej sataspekta el ĉeestantoj kaj la malplej razita. Al kiu grupo li kalkulis sin? Liaj ŝvititaj grasegaj harozaj fingroj ĉiufoje, kiam estis lia vico ĵetadi ludkubetojn, pene kolektadis ilin. Ekparoli pri problemoj de malriĉeco rekte en la skvaro Dajan ne kuraĝis. Ŝi nur proponis fotiĝi kun la nardoludantoj. Eĉ tra la vidserĉilo de la fotilo videblis, ke ŝi malkontentis. La kahetianoj interrompante unu la alian ekinvitis gaste. Tiu, la plej dika, montris al la kastelo kun brilanta tegmento trans la placo, nomadis ĝin la sia kaj invaditis plej arde. La usonanino rezignis.

Dajan ekdeziris eksidi apud la stiristo. Mi malfermis la antaŭan pordon de la aŭto kaj la usonanino enŝoviĝis enen. Ekkapricis motoro. Sergo kraĉis pro domaĝo. “Oni parolis al mi, ke mi ne prenu fuelon en tiu ĉi benzinejo! Nun devos mi la klapojn purigi!” Li eliris el la aŭto, levis kapoton kaj komencis umi en la motoro. Dajan ruĝiĝis, sulkigis la brovojn sed nenion diris. Mi elaŭtiĝis kaj aliris la stiriston.

– Pardonu min, ĉu vi estas francoj? – prononcis iu malantaŭ mia dorso.

Mi rigardis returnen al la demandinto. Parolis altstatura malhelhara junulo, proksimume tridekjara. Li iom spasmospiris. Verŝajne, li hastis, kaj, eble, al ni. Lia staturo montris fiuzulon: kava brusto, kurbeco, troa magreco. Kostumo, kiun evidente oni zorge sed mallerte antaŭnelonge gladis, pendis kvazaŭ sako. Kolumo de pura ĉemizo ne povis volvokovri lian maldikegan kolon. Eluzita kravato ŝajnis flankenita. Bela vizaĝo povis ekŝajni viveca, se ne estus tia aspekto de malhelaj okuloj (pli ĝuste ĝia foresto). La okuloj igis min ektemi, ĉar ili ne brilis, turnitaj enen, ili timigis per sia nevideco.

Ne finatendinte la respondon li sufiĉe vikle daŭrigis france:

– Mi aŭdis en la pariza radio, ke al Kartvelio devas veni ekspedicio, kiu sekvos la itineron de Aleksandro Dumas en Kaŭkazio.

El skvarprofundo ekaŭdiĝis voĉoj de niaj konatuloj, avertantaj junulon ne maltrankviligi la gastojn per “stultaĵoj”. Li ne atentis ilin. La francan mi sciis nebone, sed komprenis pri kio temis kaj respondis kartvele. Mia respondo evidente seniluziigis nekonatulon.

La interparolon aliĝis Dajan. Al ŝi ŝajnis, ke nun ŝi ekparolos pri la objekto de la esplorado. Ne elaŭtiĝinte kaj plene malferminte la pordon de la aŭtomobilo ŝi en la rusa turnis sin al neatendita parolanto. El la interparolo ni eksciis, ke lia nomo estas Lado, li ne estas edziĝinta, laboras kiel bibliotekisto kaj havas malsanan patrinon. Lado estis ĝentila kun la usonanino, sed montradis malpaciencon kaj konstante rigardis foren en la finon de la strato, de kie – kiel al li ŝajnis – jen-jen aperos la ekspedicio. Poste, ne respondinte la vican demandon pri siaj enspezoj, li tute koleriĝinte eksklamaciis:

– Jam kelkajn tagojn mi ĉeestaĉas ĉi tie surplaco en atendado! Eĉ ne iris labori al kamparo!

– Ĉu vi certas, ke la ekspedicio devas veni? – demandis mi.

² Kahetio – la provinco de Kartvelio

– Oni diris en franca radio... Dumas estis ĉi tie.
 Mi strebis certigi, ĉu tiun informon oni mesaĝis en la kartvela radio aŭ televido.
 – Mi ne scias, – sekvis la respondo.
 Sergio daŭre fosumis en la motoro, sed rimarkeblis, ke li aŭskultadis la okazintaĵojn. Dajan komprenis, ke intervjuo ne rezultigas, plene ofendiĝis kaj eksilentis.
 – Ĉu al vi iu komisiis renkonti francojn?
 Li ĵetis al mi tiun rigardon, kiu klare komprenigis al mi nekonvenecon de tiu ĉi demando. Videblis, ke en daŭro de la interparolo la okuloj de Lado turniĝis al la mondo kaj iĝis pli vivaj.
 – Kie vi ellernis la francan?
 – En Tbiliso, en agrikultura instituto, – diris li kaj ruze ekridetis, – mi studis vinproduktadon kaj ekinteresiĝis pri francaj vinoj. Mi bonŝancis, ni havis perfektan lingvoinstruistino – Helena Arnoldovna. Kiel knabino ŝi venis al Kartvelio el Svislando. Ŝi jam mortis, kompatinda. Tute maljuna estis.
 Lado abrupte kortuŝe ekridetis.
 – Foje ŝi ekrememoris la tagon de sia forveturo el Svislando. Estis fulmotondro. Ŝi timis tondron. La pli aĝa kuzo diradis al ŝi, ke en ĉielo ruliĝas granda barelo kaj ĝi falos sur ŝian kapon.
 La lastan frazon li ripetis en la franca.
 – Kial vi ne laboras laŭ via specialeco?
 Lado malice ekridetis.
 – Mi laboris en la loka vinuzino kiel teknologo, ĝis tiu fermiĝis. Same kun la aliaj uzinoj. Plena stagnado. Jen tiu frataro (li montris perokule nardoludantojn) ankaŭ estas senlabora.
 Nun Lado pli paliĝis kaj kvazaŭ malgrandiĝis.
 – Pardonu min, mi eksidu. En la okuloj ĉio malheliĝis. Ekde mateno mi nenion manĝis. Malbenita malsano kaptas min.
 Li eksidis sur la platan ŝtonon, restaĵon de la skvara barilo. Tio allogis atenton de la usonanino, ŝi vigliĝis.
 – Kiu estas via familinomo? – demandis li min.
 Mi nomis.
 – Preskaŭ same kiel ĉe la heroo de Marcel Proust en la romano “Du cote de chez Swann”³, – diris li enpensiĝinte kaj denove ekrigardis foren, en la finon de la strato.
 Subite ekbruis la kapoto. “Pretas, eblas veturi!” – prononcis solene Sergio. Al mi ekŝajnis, ke Lado ekmaltrankvilis. Dajan demandis min angle, ĉu oportunas donaci al ĉi junulo dekon da dolaroj. La projekto antaŭplanis donacofunduson por respondantoj. Lado ĝentile rifuzis la donacon.
 – Estus nemalbone, se vi sendus al mi el Tbiliso pilojn por mia radioaparato. La miaj plene eluziĝis, – turnis li sin al mi.
 Nia “Fordo” retroturniĝis. Tra la levita per ĝi polvo videblis magra staturo de la junulo. Li staris apoginte sin per la maldekstra mano al la barilo.
 – Pli bone li aŭskultu kartvelan radion kaj laboru en la vitejo, – rimarkis Sergio.
 Dajan sidis ruĝiĝinta kaj tute nenion komprenadis.
 “Kiu jarcente foje ĉi tien venos franco”, – ekpensis mi.

Tradukis Svetlana Smetanina

La 23-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO ROSES 3-11.10 2015

La aranĝo okazas ĉiujare aŭtune en Katalunio. Ĉi-foje ni ĝuis ĝin en la ĉe-mara urbo Roses (hispane Rosas), kiu situas tute proksime al la franca limo. La urbo estas grava turisma kaj kultura centro kun hoteloj, plaĝoj kaj du havenoj. Unu utilas por la fiŝkaptado kaj alia por la plezuro, kie en kanaloj navigas privataj ŝipoj. En Roses troviĝas ankaŭ pluraj antikvaj konstruaĵoj, inter kiuj estas unika historia citadelo.

La eventon partoprenis 98 esperantistoj el 13 landoj. Ni loĝis en komforta tristela hotelo “Sant Marco”, kie ni bone manĝis kaj ĉiuvespere eblis danci ĝis la noktomezo. Por niaj ĉiutagaj aktivaĵoj ni havis je dispono grandan salonon. En la inaŭguro ni

³ “Du cote de chez Swann” (france) – “Al Swann” (esperante) estas romano de la fama franca verkisto Marcel Proust.

havis la plezuron bonvenigi la urbestrinon de Roses s-ino Montse Mindam. Ŝi adresis al ni agrablajn vortojn kaj bondeziris sukcesan E-Semajnon. Ŝi ankaŭ menciis, ke en la fora pasinteco en la urbo jam ekzistis esperantista grupo.

Dum la semajno okazis pluraj interesaj prelegoj, debatoj kaj diskutoj. Kun Dalia Pileckiene el Litovio ni lernis kiel mastrumi nian tempon. Alian tagon ni alfrontis iom komplikan temon, kiun ni devis solvi el psikologia vidpunkto. Gesinjoroj Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer el Svislando prezentis la libron "Historio de la esperanta literaturo". Giorgio verkis ĝin komune kun Carlo Minnaja. Interesatoj povis aĉeti ĝin surloke. Alia ilia prelego temis pri ENA (Esperanto Natur-Amikaro). Ni akiris informojn pri ilia laboro kaj pri la estontaj planoj. Marcel Delforge el Belgio parolis pri la historio de Neutrala Moresnet, kie estis fondita kaj iom da tempo ekzistis Esperanto-Amikejo. Gesinjoroj Buŝs el Latvio prezentis verkojn de la latva poeto Imants Ziedonis. Prelego de Luis Serrano temis "Ĉu malaperos nia planedo Tero?" Tio estas pripensenda temo...

Vespere ni ĝuis du interkoniĝojn kun vino kaj dolĉaĵoj. Bonan etoson kreis la folkloro grupo "Montjuic", kiu ĝojigis nin per belaj kantoj "Habaneras". Ne mankis nia ŝatata "cremat" - bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj. Unu vespero estis dediĉita al opero. Laŭ propono de Maria Ferigle ni spektis sur ekrano operon de la itala komponisto Giacomo Puccini "Madame Butterfly".

La premio "Ada Sikorska" estis atribuita al la pola blinda poetino kaj prozverkistino Halina Kuropatnicka-Salamon pro ŝia meritplena poresperanta laboro. La prestiĝan premion oni jam pli frue sendis al ŝi okaze de festa renkontiĝo. S-ino Halina estis tre kortuŝita kaj sendis dankleteron al s-ro Luis Serrano.

Kiel jam konate Rodica Todor el Rumanio ĉiam proponas interesan instruprogramon. Ĉi-foje ni debatis pri strategioj de komunikado en homaj interrilatoj. Ni laboris en grupoj kaj alfrontis diversajn temojn. Ekzemple, konfliktoj inter generacioj, diversaj grupoj, asocioj ktp. Aktuala situacio pri enmigrintoj ankaŭ estis traktita. La temoj estis tre vastaj kaj ni vigle diskutis, donis niajn opiniojn, analizis kaj provis trovi pozitivajn en diversaj situacioj. Aparte ŝi organizis paroligan kurson por komencantoj.

Okazis ankaŭ ekskursoj. Dum la duontaga ekskurso ni vizitis urbeton L'Escala, kie ni en fabrikejo vidis prilaboradon de anĉovoj. Poste ni gustumis ilin. Kompreneble, ne mankis aĉeteblo. En la urbo Roses ni vizitis lokan muzeon kaj citadelon de la 17-a jarcento kun grekaj kaj romiaj restaĵoj.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la proksima urbo Figueres. Unue ni vizitis la kastelon Ferran kaj poste la faman muzeon de Dali. Posttagmeze ni daŭrigis nian busvojaĝon ĝis la urbeto Banyoles. Tie ni restis dum kelkaj horoj ĉe la lago. Eblis ŝippromeni sur ĝi aŭ uzi turisman trajneton por traveturado de la urbo. Iuj tutsimple piedpromenis laŭ la bordo de la lago. Post agrabla kafumado kaj biertrinkado ni revenis kontentaj al Roses.

Lastan vesperon Luis Serrano lanĉis debaton pri funkciado de la Semajno. Partoprenantoj estis plejparte kontentaj. Nur la alveno al Roses estis ĉi-foje iom pli

komplika ol kutime pro neekzisto de trajno ĝis tie. Ni promesis veni denove venontjare. Tiam Luis, la ĉeforganizanto festos sian 90-jariĝon. Do, ni deziras al li kuraĝon kaj sukceson!!!

Liba Gabalda

Novaĵoj el



Jubilea TORPEDo en Herzberg

Saluton!

Jen mallonga raporto pri Torpedo 10 okazinta inter 29.09-05.10.2015.

La dekan fojon okazis la Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia (mallonge: TORPEDo) en Herzberg am Harz, organizita de la Esperanto-Centro (Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo) kaj AGEI (Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj), gvidita de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy.

La ĉefa celo estis instrukapabligo: lertigi instruemulojn kaj ekipi ilin per scio pri taŭgaj instrumentoj, didaktikaj konsiloj, instrumaterialoj, helpiloj, ludoj, ktp. por efika instruado de Esperanto ĉu en lernejoj aŭ movadaj kursoj, ĉu en klubkunvenoj. La faka programo realiĝis en metieja laborformo por individua aŭ et-grupa taskosolvado, diskutado, spertinterŝanĝo. La trejnadon helpis la rekta atingo de fakliteraturo, trarigardeblo de lernolibroj kaj praktika uzado de instruhelpiloj en la biblioteko de la Esperanto-Centro.

La internacia partoprenantaro ĝuis ankaŭ la libertempajn aktivaĵojn, renkontiĝon kun Esperanto-klubanoj en Herzberg, vizitojn al historiaj urboj, vidindaĵoj en la regiono kaj ekskursojn en la Harz-montaro.

Por informoj pri trejneblo kaj datoj de trejnsesioj en 2015, poste en 2016 bv. kontakti nin per <http://esperanto-urbo.de>

Kun amikaj salutoj,

Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar
Interkultura Centro Herzberg

Esperanto-Trajno en Pollando

La pola ŝtata fervoj-entrepreno akceptis la trajno-nomon ESPERANTO! En la fino de la voĉdonado, anoncita semajnon antaŭe, la nomo Esperanto havis 3940 voĉojn, la nomo Narew 2509 voĉojn, Bojary 200 voĉojn.

La interurba rapidtrajno "IC Esperanto" funkcios ekde decembro, kaj denove aŭdeblos la nomo Esperanto en polaj stacidomoj. *(Pli frue jam funkciis trajno kun la sama nomo inter Białystok kaj Warszawa, sed ĝi estis nuligita en junio 2013, ĉar uzis ĝin nesufiĉe multaj pasaĝeroj.)*

KORAN DANKON AL ĈIUJ VOĈDONINTOJ EN LA TUTA MONDO!

Via voĉdono multe helpis en la diskonigo de Esperanto en la pola ekstermovada medio. Sen via helpo la sukceso ne estus atingita!

En <https://www.facebook.com/PKP.Intercity?ref=stream> estas publikigitaj la akceptitaj nomoj de ĉiuj 10 trajnoj, por kiuj fejsbukanoj voĉdonis:

1. Warszawa – Białystok --> Esperanto
2. Warszawa – Olsztyn --> Kortowo
3. Warszawa – Łódź --> Uszatek
4. Warszawa – Łódź --> Deyna
5. Gdynia – Wrocław --> Bursztyn
6. Gdynia – Wrocław --> Błyskawica
7. Katowice – Poznań --> Koziołki
8. Warszawa – Bydgoszcz --> Łuczniczka
9. Warszawa – Bydgoszcz --> Kujawiak
10. Warszawa – Lublin --> Bystrzyca

Sinceran dankon al ĉiuj kunlaborintoj, voĉdonintoj!

Sukcesa Laboro de ILEI

ILEI raportas:

Raportas la Estraro pri trimonata agado de 2015-07-15 ĝis 2015-10-15

Eventoj

48-a Konferenco 2015 en Belgio

De la 17-a ĝis la 25-a de julio en **Oostende**, Belgio, plensukcese disvolviĝis la 48-a Konferenco, rekorda en la historio de ILEI : 170 aliĝoj el 34 landoj , 138 partoprenintoj el 30 landoj. Junuloj kaj infanoj partoprenis, kio gravas .

Okazis: malferma ceremonio en la urbodomo kun la urbestro; 3 sesioj por la Komitato, elektoj de nova estraro. La protokolo de la 3 sesioj estas en voĉdona procezo por aprobo.

Instruista Trejnado (IT) sukcese okazis kun 45 partoprenantoj, 9 prelegoj, 3 atelieroj. Atestilojn ricevis 25 partoprenintoj.

Estis organizitaj: 20 prelegoj; sesio de KER-ekzamenoj kun 6 kandidatoj; simpozio kun 10 prelegoj; Lingva Festivalo kun 35 lingvoj ; kurso por komencantoj (por ĝis 12 partoprenantoj).

Abunde ofertis la libroservo de Flandra Esperanto-Ligo (FEL).

3 laborgrupoj funkciis: pri lerniloj kun Katalin Kovats; pri ILEI kaj TEJO kun Radojica Petrovic; pri verkado de Rezolucio.

La Konferenco altiris grandan atenton de ekstermovada kaj loka publiko – pere de organizitaj programeroj: Nacia vespero, kvartala festo k.a. Lokaj gazetoj raportis per 4 artikoloj antaŭ kaj post la Konferenco. Unu radio-intervjuo okazis.

Tiu bona rezulto eblis per efika laboro de sespersona loka skipo.

UK Lille

ILEI havis propran budon dum UK. Ankaŭ ILEI aperis kadre de la Movada Foiro.

Deĵoris tie komitatanoj de ILEI kaj Sonia Risso el Urugvajo.

Estas kutimo, ke la prezidanto de ILEI alparolas la kongresanaron okaze de la solena malfermo. Tion faris Mireille Grosjean.

ILEI zorgis pri la **Tago de Lernado** (tutan mardon de UK) prezentinte diversajn prelegojn pri pedagogio. Mireille GROSJEAN vekis la intereson de la ĉeestantoj per la temo “Pacedukado, paŝoj al plena konkretiĝo” kaj per sia “Raporto pri la Tria Tutmonda Kolokvo”, okazinta ĉi-jare en Svislando. Estrarano Prof.Dr.GONG Xiaofeng faris prelegon pri « Kapabligo de transkultura komunikado kaj E-instruado » .

Venonta Konferenco

Nyíregyháza (HU) gastigos nian 49-an Konferencon en 2016 post UK en Nitra (SK). La konferenca temo estos “Novaj vojoj de lernado”, temo elektita de la partoprenantaro de la 48-a Konferenco. Meze de septembro nia estrarano pri Konferencoj Radojica Petrovic iris al Hungario por viziti la okazejojn, renkontiĝi kun la loka skipo kaj prepari tiun nian gravan eventon. La laborkunsido kun LKK daŭris 3 tagojn.

Vivo de la Ligo

Nova Estraro

Dum la 48-a Konferenco en Oostende estis elektita nova estraro de ILEI por la jaroj 2015-2018. La Komitato de ILEI decidis, ke la estraro konsistos el 7 membroj elektitaj el 9 kandidatoj. El ili 4 membroj plu deĵoros kaj 3 elektiĝis.

Post la Konferenco okazis interna diskuto ene de la estraro por disdoni la taskojn. La afero decidiĝis jene :

Mireille GROSJEAN

Prezidanto

Kunordiganto de la laboro de la estraro

Respondeculo pri eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj)

Respondeculo pri informado pri la Ligo

Kunordiganto pri ekzamenoj

Reprezentanto de ILEI ĉe la estraro de UEA

Xiaofeng GONG « Arko »

Vic-prezidanto

Kunordiganto pri universitata agado

Emile MALANDA NIANGA

Sekretario

Respondeculo pri rilato kun la sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj

Kunordiganto de KolegHelpa Kaso (KhK)

Elena NADIKOVA

Vic-sekretario

Respondeculo pri raportoj, protokoloj kaj informado al la Komitato

Kunordiganto de Lerneja Agado

Kunordiganto pri Eo-centroj

William HARRIS

Kasisto

Radojica PETROVIC

Estrarano pri Konferencoj

Respondeculo pri retaj aferoj

Respondeculo pri kontaktoj kun TEJO

Kunordiganto pri la projekto « Interkulturo »

Ivan COLLING

Estrarano

Survoje estas starigo de la **laborkomisionoj de ILEI**, okazos aprobo de tio per komitata reta voĉdono.

Nova Internacia Ekzamena Komisiono

Estis elektita ankaŭ nova Internacia Ekzamena Komisiono (IEK). Ĝi konsistas por la jaroj 2015-2018 el 7 eminentaj esperantistoj. La Prezidanto estas Karine ARAKELJAN. Membras Jérémie SABIYUMVA, Arikapalli Giridhar RAO, Monika MOLNAR, Mireille GROSJEAN, Christophe CHAZAREIN, HAN Zuwu. La Komitato de UEA same aprobis ĝian konsiston.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR) aperas sub la sendorma prizorgo de Jozefo Nemeth. Bonega kaj intensa kunlaboro inter Jozefo Nemeth kaj la prezidanto okazadas regule de pli ol du jaroj. La redaktoro penas aperigi ĉiam ĉion aperigeblan. Notindas, ke okaze de restado de Mireille Grosjean en Budapeŝto en septembro eblis, ke Jozefo kaj Mireille unuan fojon renkontiĝis kaj diskutis vidalvide ! Notindas, ke en la presejo de FEL en Antverpeno (BE) la maŝino atingis la finon de sia energio ; konsekvence FEL donas la laboron al ekstera firmao ; konsekvenco de tio estas, ke koloraj fotoj povas aperi interne de la revuo sen altiĝo de la presprezo.

Juna Amiko (JA) aperas kvarfoje jare. Fidela skipo zorgas pri bunta enhavo de la revuo. Kreskas la nombro de abonantoj (en julio-aŭgusto venis 100 pliaj abonoj). Abundas la laŭdoj. Jen citaĵo de B. Ragnarsson adresita al Stano Marcek: “Juna Amiko estas admirinda kaj aspekte kaj enhance. La revuo multon gajnis sub via redaktado, ĝi estas pli varia kaj pli lerte aranĝita, kaj la riĉa sortimento de bildoj allogas junajn legantojn. Mi havas la impreson, ke la nova aspekto de la revuo ankaŭ allogos novajn kapablajn verkantojn. La lingvo estas saĝe diversnivela, enestas facilaj legaĵoj por komencantoj kaj pli altnivelaj por pli spertaj esperantistoj. Ludoj kaj solvotaj taskoj, informoj el Esperantujo, instruaj artikoloj por sciaviduloj kaj literaturaj tekstoj, bele interharmonias. Entute mi povas aserti, ke *Juna Amiko* jam nun apartenas al plej celhavaj kaj belaj Esperanto-revuoj. ». Post interkonsento inter la redaktoro Stano Marcek kaj Mireille Grosjean aperis (2015-10-09) oferto en la Facebook paĝo de “Duolingo Esperanto Learners”, lernantoj de Esperanto, ke ili povas mendi ĉe Stano aŭ unu paperan ekzempleron senpagan aŭ unu senpagan retan. Venas ĉiun tagon kelkaj petoj.

Membroprizorgado estas la tasko de Sebastian Cyprych (Pollando)

En Bjelovar (HR) estis planita **ILEI-Festivalo** en aŭgusto 2016. Post komencaj kontaktoj la laboro montriĝis malfacila kaj la estraro en Oostende decidis ĉesigi la agadon. Eble iam prezentiĝos la okazo lanĉi tian eventon.

ILEI konsistas el 39 **sekcioj**. En kelkaj el ili la etoso malfacilas kaj la estraro devas sekvi la eventon kaj trovi adekvatan solvon.

Sesio de **Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA** estis petata en Togolando. Pro malkongruo kun la regularo kaj manko je taŭga solvo la sesio ne povis okazi.

ILEI en la Reto

Estas en Facebook paĝo **"ILEI labortable"**. Mireille Grosjean komencis uzi Facebook okaze de la Tria Tutmonda Kolokvo kaj tiam ŝi malkovris tiun paĝon, kie estis 21 membroj. Ŝi aktive uzis ĝin por informi pri la Ligo. Nuntempe membras 70 personoj kaj la diskutoj eblas por membroj, kiuj ne povas partopreni niajn Konferencojn. Do temas pri valora eblo diskuti inter instruistoj pri pedagogiaj aspektoj kaj pri la vivo de la Ligo.

Facebook-an grupon **"Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj"** partoprenas 123 membroj interesataj pri la vivo de ILEI kaj pri E-pedagogio. Ĝin sekvas kaj subtenas la estrarano Radojica Petrović partoprenante en diskutoj kaj publikigante informojn pri ILEI, plej aktuale pri la 48-a Konferenco.

Estas en Facebook paĝo **"Duolingo Eo Learners"**, kie multaj komencantoj (2800 personoj aliĝis al la paĝo) esprimas siajn bezonojn, konstatojn, ĝojojn. Diversaj spertaj esperantistoj reagis, inter aliaj nia prezidanto. Tie ni povas kapti la emojn, bezonojn, problemojn, de tiuj komencantoj kaj tio gvidos nin en nia estonta laboro.

Kontaktoj kun movadaj institucioj

La prezidanto kaj estrarano pri konferencoj arde kunlaboris kun **UEA kaj TEJO** kaj kun aliaj esperantistaj institucioj kaj individuoj por venigi junulojn el Afriko, Azio kaj Latinameriko al la eŭropaj eventoj de julio-aŭgusto. La sukceso estis parta: 2 esperantistoj el Benino, 1 el DR Kongo, 3 el Indonezio, 2 el Orienta Timoro, 2 el Kubo kaj 1 el Nikaragvo. Ne sukcesis akiri Schengen-vizon 3 samideanoj el Senegalio, 3 el Togolando kaj 2 el Burundo, kiuj komplete kontentigis la postulojn por akiri tian vizon. Unu junulo el Benino ne kontentigis la kriteriojn de Schengen, tamen obtenis vizon. Jen la neantaŭvidebla situacio en tiu kampo.

Okaze de la 48-a Konferenco en julio 2015 estrarano Radojica Petrovic, respondeculo pri kunlaboro de **ILEI kun TEJO** gvidis debaton pri estontaj paŝoj por krei allogan programon por junuloj kadre de la ILEI evento kaj por fari lokon por ILEI kadre de IJK. Temis pri tre fruktodona diskuto.

Laŭ sugesto de la estraro de UEA okazos la **Jaro de la Lernanto** de Nitra UK (2016) ĝis Seula UK (2017). Kompreneble tia agado okazos kunlabore kun ILEI. Unuaj skizoj okazas nun. Aparta laborgrupo traktos la temon dum la 49-a Konferenco en **Nyíregyháza, Hungario**.

En aŭgusto Radojica Petrovic prelegis en du tutsemajnaj staĝoj ĉe la **E-kulturdomo Grésillon**, partnero de ILEI, gvidis kursojn de serbaj lingvo kaj kulturo kaj de Esperanto kaj E-kulturo en la dum la staĝo Lingvoj kaj kulturoj (<http://gresillon.org/spip.php?article139>) ; en la tujposta Festa Semajno por infanoj kaj familioj (<http://gresillon.org/spip.php?article138>) li gvidis konversacian kurson por progresantoj per interkulturaj lernado kaj ludoj . Dum tiuj du semajnoj li ankaŭ prelegis pri kaj varbis por ILEI.

La redaktoro de la **Revuo ESPERANTO** Sinjoro Fabricio Valle proponis, ke en ĉiu numero estu du paĝoj pri ILEI. Konsekvence ni pripensas temojn, esploras pri verkantoj, verkas mem; tre oportuna propono.

Temas pri kutimo, ke ILEI sekvas la valoran agadon de **edukado.net**, subtenas kaj kontribuas laŭ siaj ebloj.

La prezidanto sendis **salutmesaĝojn** al 4 eventoj en la mondo.

La prezidanto sendis **mesaĝojn** okaze de la Tago de Paco (21-an de sept.), Tago de Lingvoj (26-an de sept.), Tago de Maljunuloj (1-an de okt.) (laŭ sugesto de Miĥail Trifoi), Tago de la Instruistoj (5-an de okt.)

ILEI sekvas la evoluon de la **instruado de Eo** en la mondo. La Ligo ricevas informojn pri diversaj provoj kaj planoj, eldono de lernolibroj.

Kontakto kun ekstermovadaj institucioj

Venis al la prezidanto ampleksa demandaro de la **Unio de Internaciaj Asocioj (UIA)**. Mireille Grosjean plenigis ĝin kaj sendis ĝin ĝustatempe, kune kun paperaj aldonaj dokumentoj.

Plano estas, ke ILEI kandidatiĝu ĉe **UNESKO**. Komence de oktobro Mireille Grosjean kunvenis en Parizo kun Barbara Despinay, kiu deĵoras ĉe UNESKO nome de UEA kaj konas la tutmondan kulturalan institucion de 30 jaroj. Barbara sugestis, ke ILEI samtempe kun TEJO kandidatiĝu ĉe UNESKO; temas pri granda forta paŝo en la nuna momento, kiu estas aparte favora. Konsekvence la preparlaboroj okazos en oktobro novembro kaj la paŝo okazos en januaro 2016.

Asocio Eŭropa De la Instruistoj (AEDE) per sia belga sekcio anoncis la Konferencon de ILEI en Oostende kaj aperigis artikolon de Germain Pirlot pri ĝi.

Dum aŭgusto Radojica Petrovic iniciatis E-kulturalan kread- kaj kunlabor-projekton en la sfero de scenejaj artoj (teatro, muziko) kun esperantistaj kaj neesperantistaj partneroj el Serbio, Francio kaj Pollando, konforman al la **EU-programo “Creative Europe”**, por peti subvencion el tiu programo, kaj kun la ideo gastigi la projekton en la ILEI-konferenco. Montriĝis, ke la limdato, komence de oktobro, estis tro proksima; do ni decidis daŭrigi la preparojn por pretigi la projekton por la sekvontjara alvoko por projektproponoj de la sama programo.

Agadoj de ILEI

Premio La Torre

Unu persono kandidatiĝis. Ĵurio laboris. Decido okazis. La premiito estas D-ro Davide Astori (IT). La anonco okazis dum la solena malfermo de la 48-a Konferenco. La transdono okazis dum la Tago de Lernado kadre de UK. La Premio estas disdonita ĉiun duan jaron, do denove en 2017. La regularo aperas en la retejo www.ilei.info ĉe Agado -> Projektoj.

Subteno el Urugvajo

La estraro de ILEI decidis kontribui al la alveno de Sinjorino Sonia Risso el Montevideo (kune kun la bretona federacio), kiu brile organizis nian Konferencon en 2014. Ŝi alvenis al Svislando jam la 10an de majo kaj helpis dum la TTK tre efike. Dum la Konferenco kaj UK ŝi plu subtenis nin tre efike.

Farendaĵoj

Atendas renovigo de niaj retejoj, “Interkulturo”, eldona agado, instruista trejnado kaj diplomigo, membrokartoj, universitata agado, kaj aliaj.

2015-10-15 Les Brenets, CH

Mireille Grosjean

Prezidanto de ILEI



Ĝojigan Kristnaskon kaj bonan kaj sukcesplenan komenciĝon de la nova jaro al ĉiuj gelegantoj !!!

Eldonita en Magdeburg, ĉefurbo de la germana federacia lando Saksio-Anhalto nur kiel dosiero en pdf-formato, abonebla sendante retroŝtan peton al la redaktoro

Dieter Dungert, Bruno-Taut-Ring 3 e, DE-39130 Magdeburg

Telefono: (0391) 7 21 75 61,

e-poŝto: DDungert@t-online.de